



Svisa Esperanto-Societo

informas

SES informas

N-ro 1/2018 - marto 2018

Invito al la

**Ĝenerala Asembleo de
Svisa Esperanto-Societo
Ĝenevo, sabate la 14-an de aprilo 2018**

LOKO: Ĝenevo, Kulturcentro CASTAFIORE, Strato Montbrillant 20
(5 minutojn piede for de la stacidomo Ĝenevo-Cornavin)

Dato: Sabate la 14-an de aprilo 2018

Horo: de la 10-a horo al la 18-a horo.

Programo:

10 :00 Akcepto, teo kaj kafo.

10 :30 Ĝenerala Asembleo

12 :30 Komuna manĝo. Ĉiu alportu ion kaj metos tion sur tabloj. Ĉiu servas sin laŭplaĉe. Bv anonci al Sonia Daubercies tion, kion vi intencas alporti. Tiel ni evitos havi nur desertojn aŭ nur pizojn. Vi povas atingi ŝin plej bone uzante ŝian telefonnumeron 079 649 88 86.

Dum la posttagmezo okazos rolludoj gvidataj de Mirejo Grosjean.

Ni devos antaŭ la 18-a horo purigi la kuirejon kaj balai la salonon.

Ni dankas al la familio Sans, kiu rezervis la salonon por ni.

Kun amikaj salutoj

La Estraro de Svisa Esperanto-Societo

Tagordo de la ĝenerala kunveno de SES 14-an de aprilo 2018

Ĝenevo

1. Bonvenigo, kontrolo de ĉeestantoj kaj anonco pri senkulpiĝoj.
2. Aprobo de la tagordo.
3. Elekto de protokolanto
4. Elekto de voĉnombrantoj
5. Evoluo de la membraro. Mortis Yvette Goy
6. Aprobo de la protokolo de la ĝenerala kunveno 2017
7. Vivo de la societo : aprobo de la estrarraporto
8. Financoj. Prezento de la jarkalkulo kaj aprobo de ĝi.
9. Elekto de kaskontrolantoj
10. Elekto de honoraj membroj de SES.
11. Proponoj de membroj
12. Projektoj por 2018 : 22-an de sept. Festivalo en Neuchâtel.
13. Fikso de la loko por la ĝenerala kunveno 2019
14. Nia retejo, nia voĉo.
15. Buĝeto 2019 Prezento kaj aprobo.
16. Diversaĵoj

Alvoko pri pago de kotizoj 2017

Saluton,

printempo jam alvenis kaj estas pli ol tempo alvoki vin pri la pago de via kotizo 2017 al S.E.S.

Via kotizo kalkuliĝas laŭ la jena kotiz-tabelo. →

Ni lasas vin indiki la sumon sur la ĝirbulteno sube.

Noto :

Ĉar la diversaj kotiz-prezroj malsimilas, ne necesas indiki al ni vian kategorion, se vi pagas nur unu kotizon.

Male, se vi pagas **pli ol unu** kotizon, bv **detaligi** en la loko

« *Zahlungszweck / Motif versement / Motivo versamento* »

Ekz. indiku: **35 + 10 + 10** (ekz. por unu plenkreskulo kun du infanoj)
aŭ : **50 + donaco 20** (kaze de kotizpago plus donaco)

Jaraj kotizoj de SES	CHF
Infanoj ĝis 18 jaroj	10.-
Junuloj de 19 ĝis 29 jaroj	20.-
Plenkreskuloj ek de 30 jaroj	35.-
Paroj ek de 30 jaroj	50.-
Patronoj ek de 30 jaroj	70.-
Nura abono de SES informas	25.-

Poŝtkontonumero: **17-581908-4** (PostFinance)

aŭ **IBAN CH95 0900 0000 1758 1908 4**

je la nomo de Svisa Esperanto-Societo, 2300 La Chaux-de-Fonds

SES informas

- 2 -

N-ro 1/2018, Februaro 2018

Balanco 31.12.2017

		Balanco 31.12.2017		
1010	Poshtkonto (17-581 908-4)		3'627.29	
1011	Poshtsparkonto (92-7737-1)		21'486.05	
1012	Librkonto (14-89-3808-5)		654.71	
1090	UEA konto sesa-v (88.40 je 1.1690)		103.34	
1100	Inventaro		1.00	
1110	Inventaro Novaj Libroj (La Birdoj 163; Sonril-Urcxjo 610, Fahrtrichtung Esperanto 185)		9'644.00	
1140	Arbo		94.00	
1310	Transaj aktivoj Biloj AMIKUMU		5'871.75	
	Aktiva sumo		41'482.14	
2000	Transaj pasivoj (kotizoj 2018)		305.00	
2005	Skuldo UNU LECIONO pri EO		187.50	
2010	Fonduso: Muzika konkurso		2'896.17	
2020	Fonduso: JES		3'211.85	
2100	Kapitalo 1.1.2017	37 274.25		
	Malprofito	2 392.63		
	Pasiva sumo		41'482.14	
		Jarkalkulo 2017	Bugxeto 2017	Bugxeto 2018
Elspezoj				
3000	Informado, varbado	1'492.90	4'000.00	4'000.00
3010	Omagoj, laborrimedoj	198.00	0.00	0.00
3020	Subvencioj, premioj, projektoj	487.50	1'400.00	1'400.00
3110	Svisa Espero / SES informas	2'462.00	4'100.00	4'100.00
3120	Kunvenoj kaj kunsidoj (GK, estrara, regionaj)	82.40	300.00	300.00
3200	Kotizoj al UEA, EEU, ktp.	225.00	250.00	250.00
3210	Administrado (afrankoj, telefonkostoj, ktp)	20.00	300.00	300.00
3220	Bank- kaj poshtspezoj kaj kurzdiferencoj	95.54	100.00	100.00
3320	Agado (50 jaroj de CDELI)	1'000.00	1'000.00	0.00
3330	Libro eldonado (La Birdoj 170; Sonril-Urcxjo 650, Fahrtrichtung Esperanto 200)	10'260.00	13'000.00	7'000.00
3340	Transaj aktivoj Biloj AMIKUMU	5'871.75	0.00	0.00
3500	Diversajho	0.00	250.00	250.00
	Elspeza sumo	22'195.09	24'700.00	17'700.00
Enspezoj				
4200	Membrokotizoj	2'075.00	5'500.00	4'500.00
4210	Abono al SESi sen membreco	130.00	600.00	600.00
4300	Donacoj, heredajhoj	1'229.00	5'500.00	4'500.00
4500	Vendoj Libroj (La Birdoj 7; Sonril-Urcxjo 40, Fahrtrichtung Esperanto 15)	852.71	13'000.00	8'000.00
4600	Bank kaj poshtinterezoj	0.00	150.00	150.00
4800	Diversajho Libro eldonado (La Birdoj 163; Sonril-Urcxjo 610, Fahrtrichtung Esperanto 185)	9'644.00	0.00	0.00
4810	Diversajho Biloj AMIKUMU	5'871.75	0.00	0.00
	Enspeza sumo	19'802.46	24'750.00	17'750.00
	Profito/Malprofito	-2'392.63	50.00	50.00

20.03.2018 Oxana Grazhdanova

(Ĉi provizora bilanco ankoraŭ ne estas kontrolita de la kaskontrolantoj, do povas okazi eblaj modifoj ĝis la ĜK)

Jarraporto des Svisa Esperanto-Societo pri 2017

Eventoj :

- 21.01.2017 : Fribourg, ĝenerala Asembleo de SES, kun prezento de la instituto pri plurlingvismo kaj prelego de Zorana Sokolovska, esploristino en la centro.
- 19 – 26.01.2017 : Soloturn : Soloturnaj Filmtagoj: **Der Kleine Tisch der Weltregierung | La Eta Tablo de la Mondregistaro** (Parzival) estas prezentita.
- 04.02 : Ĝenerala Asembleo de la amikaro de CDELI en La Chaux-de-Fonds.
- 21.03: Sonceboz: Inaŭguro de la ekspocio Adora Krudarto. (Parzival)
- 05.04 : Biel/Bienne: Inaŭguro de la dulingva libro angle/esperante de Eveline Porter «**L'Oiseau (The Bird - La Birdo)**»
- 14.04 : Zürich : Inaŭguro de la libro de Klaus Friese kaj aliaj: **Fahrtrichtung Esperanto**
- 13.05: Martigny: 1a Valeza Esperanto-Tago. Diskutrondo pri fondo de Valeza Esperanto-Grupo. Vizito de pentraĵ-ekpozicio *Hodler Monet Munch*.
- 25-28.05 : Les Brenets : **Aktivula Maturigo AMO** (de UEA) kun Monika Molnar, Katalin Kovats, Stefan McGill, Mireille Grosjean.
- 01.06: Zürich: Kunveno de la Komunutila Societo Enge kun Prelego de Dietrich Michael Weidmann en la germana lingvo kun titolo "Fahrtrichtung Esperanto".
- 23.06: Sonceboz: Prezento de la filmo de Christian (?) pri « Parzival' ».
- 23.07 : Sonceboz : Inauguro de la Ekspozicio „**Memfoto-libera Arto**“ (Parzival ')
- 10.09 : Soloturno: **Postsomera renkontiĝo kaj ĝenerala kunveno de la svisa ILEI-sekcio.**
- 30.09-01.10 : La Chaux-de-Fonds: **Solenaĵoj okaze de la 60-jariĝo de CDELI**
- 04.11 Libroinaŭguro de **Sonoril-Urĉjo** kun koncerto de Kim Hendriksen en la vendejo Esperanto-Freestyle en Rapersvilo-SG
- 09.12 : Basel : **Trilanda Zamenhoffesto de la Esperanto-Societo Bazelo**, kunvenigis homojn el foraj urboj de Svislando, Francio kaj Germanio.

Regulaj kunvenoj :

- Genève : - Kasta Festo : 04.03, 29.04, 01.07, 30.09, 25.11
- Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn
- La Chaux-de-Fonds: Studsabato: Principe ĉiun 3-an sabaton de la monato.
- Zürich : Kafejo Mandarin , Libera kunveno kaj kafoklaĉo
- Lausanne: - Babila rondo, espace Dickens
- Bazara budo de la laŭzana esperanto-Societo : 20.05, 10.06
- Wil aŭ Flawil : kunvenoj de la Esperanto-Klubo Wil
- Biel : Ronda Tableo de la Mondregistaro - Kreado de Espero-mono kun Parzival'

Paralelaj eventoj, kie esperanto aperis

- 22.08 : Mirejo aperas en la **aikido lernejo de Neuchâtel** dum du vesperoj por traduki prezenton de Kimura Sensei el esperanto al franclingva publiko.
- 16-17.12 : Biel : **Kleine Bieler Büchermesse (Eta Biela Librofoiro)**, en kiu esperanto aperis el tri flankoj :
- Aperigo de la monografio pri Parzival', kaj lia budo en la foiro.
- budo de Allsprachendienst Esperanto GmbH kun prezentado de ties Espranto-eldonprogramo (**Sonoril-Urĉjo, Fahrtrichtung Esperanto ...**)
- Budo de Eveline Porter kun prezento de **L'Oiseau (The Bird – La Birdo)**
- 4-6 julio : Mireille Grosjean kaj Ueli Hänni instruis esperanton en la gimnazio de **Langenthal**.

Café des langues, La Chaux-de-Fonds : ĉiu-monate, oni kunvenas por paroli ĝis 20 lingvojn, interalie esperanton.

Novajoj

Dietrich Michael Weidmann elektiĝis kiel komitatano A ĉe UEA nome de Svislando.

Mireille Grosjean elektiĝis kiel komitatano A ĉe UEA nome de ILEI

Mirejo pretigis la dokumentojn por **UNU LECIONO POR ĈIU LERNEJANO** pri eo. Ŝi liveris 20 dosierojn al Neuchâtel por ĉiuj lernejoj de la kanton.

Evoluo de la membraro

Fine de la jaro 2017 membras 151 personoj en la societo, unu pli ol en la antaŭa jaro : Du eksiĝis, unu mortis, sed du nove aliĝis. Novaj membroj estas André Mueller kaj Eügen Wa Hoerkens. Mortis Yvette Goy

Plej malavaraj membroj

André Sandoz

Verena & Gabriel Chaves-Waldes

Alois Koller-Mutschler

Laurence Ducret Aïdonidis

Eugen WA Hoerkens

Ni dankas ilin pro ilia aparta subteno al la societo.

Jarraporto redaktita de Luko Allemand en marto 2018

Bela Suno en Villars-sur-Ollon <http://www.beausoleil.ch/>

La kolegio Beau-Soleil (Bela Suno) estas konata institucio en la kantono Vaŭdo, kiu lertigas 240 junulojn el la tuta mondo. Estas franclingva sekcio kaj anglalingva sekcio. Temas pri endoma studado kompreneble. En tiu lernejo laboras instruisto el Meksiko, kiu en sia junaĝo aŭdis pri Esperanto. Kiam la tuta instruistaro preparis specialan programon pri novaj vojoj por la mondo por la sabato 24-an de marto, tiu instruisto proponis prezenton de Esperanto. Li esploris en la Reto, vokis ien tien, ricevis rifuzojn, kaj finfine vokis Mireille Grosjean. Feliĉe la dato proponita de li konvenis al ŝi kaj la afero estis decidita. Mireille sugestis, ke ŝi devus havi helpanton. Ŝi trovis Sonia Daubercies. Tiu duopo efike funkciis, Mirejo parolante kun LEGO-pecoj en la mano, rigardante al la publiko, Sonia skribante ĉe blanka tabulo.

En plej bela suna tago ariĝis la gestudentoj por konuma spektado de filmo : la parto pri EO de la filmo de Sam Green « Utopia in four movements ». Poste okazis prezento de EO al 5 grupoj per po 30-minutaj kunsidoj. Okaze de la kursetoj la studentoj atenteme partoprenis la prezenton de -in- kaj -id- kaj sukcesis post 5-minuta leciono trovi mem vortojn, kiuj ekzistas nek en la franca nek en la angla : kolombino, kolombido. Mireille insistis pri tiu « miraklo ». Kelkaj studentoj brile kontribuis per ĝustaj respondoj kaj ricevis donacojn. Pluraj geïnstruistoj montris fortan intereson. La fina parto de la tago estas spektado de la filmo « Demain » (morgaŭ), kiu prezentas novajn vojojn por agrikulturo. Mireille sendis antaŭe plurajn paĝojn kun ĝeneralaj informoj pri EO cele al fotokopiado kaj povis disdoni ilin al ĉiu studento fine de ĉiu kurseto.

Raportas Mireille Grosjean

Esperanto-Librejo Zuriko
Archstr. 2, 8610 Uster

<http://librejo.ch>

Subtenu nian eldonan laboron mendante viajn librojn pere de la Esperanto-Librejo Zuriko! Se la mendosumo superas CHF 50.- la livero interne de Svislando okazos sen aldono de sendokostoj. (Vi povas ĉe ni mendi librojn de ĉiuj svisaj eldonejoj, sendepende de la lingvo)!

Vi povas mendi viajn librojn tra nia retejo <http://librejo.ch> aŭ viziti nian librejon surloke en Uster. Horaro: La librejo estas malfermita por vizitantoj nur post interkonsento pri horo. Do necesas nepre antaŭa anonco!

Jen: Nepre havenda libro por ĉiuj germanlingvaj movadanoj:



SES informas

SVISA KALENDARO

Pri la riĉa programo de la Esperanto-movado en Svislando regule ĝisdatigas vin la retejo de la Svisa Kalendaro.


Vi trovas ĝin je

<http://esperanto.ch/kalendaro>

respektive:

<http://svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro>

Sonoril-Urĉjo en Esperanto haveblas ĉe <http://librejo.ch> por CHF 16.50



Redaktaj informoj:

SES informas aperas 2018 3-foje jare en februaro (redaktofino jan 31) kaj septembro (redaktofino aŭg 31) kaj oktobro (redaktofino nov 30)
Svisa Espero aperas 1-foje jare venonta eldono 2018/06 en juni 2018 (redaktofino 31-an de majo 2018)

Respondeca redaktisto:

Dietrich Michael Weidmann

Redakta adreso:

SES informas / Svisa Espero
Allsprachendienst Esperanto GmbH
Archstr. 2, Poŝtfako 26, CH-8613 Uster
3

Tel. +41(0)44 251 50 25

Fakso: +41(0)44 261 04 79

Retpoŝto ses-informas@esperanto.ch



Studsabatoj en CDELI

Malkovro kaj studo de esperanto

Por plenumi la bezonon praktiki la lingvon sub la gvido de atentaj pedagogo, la Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI), fako de la Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds, regule organizas studsabatojn, malfermitaj por ĉiuj. Ili estis organizitaj de Claude Gacond dum jardekoj, nuntempe gvidataj de Mónica Molnár, Nancy Fontannaz, Luc Allemant, Stefano Keller, Nicole Margot, kunlabore de Danielle Carrier.

Datoj de la studsabatoj en 2018:

20 januaro, 17 februaro, 17 marto, 21 aprilo, 26 majo, 16 junio,
8 septembro, 20 oktobro, 17 novembro, 15 decembro.

3 studgrupoj: komencantoj, progresantoj, supera nivelo.

Kosto

Po 15.- svizaj frankoj por studsabato (senpage por studentoj).

Aliĝo

Por faciligi la organizon de la evento, la partoprenantoj anoncu sin ĝis la antaŭa mardo, indikante siajn nomon, adreson kaj telefonnumeron, perrete: esperanto@cde.li - telefono: 021 728 31 27 (kun respondilo) aŭ 032 967 68 42 (CDELI).

Horaro de la sabatoj

10.00 : Malfermo de la salono de CDELI :

Eblas aĉeti novajn librojn : lernolibrojn, vortarojn, beletraĵojn, ktp, kaj tre malkostajn brokantajojn.

10.20 : Oficiala malfermo kaj formo de la studgrupoj.

10.30 : Unua studperiodo. Ĝenerale oni laboras en la salono de CDELI kaj en apudaj salonoj, kiujn la lernejo disponigas al ni.

11.30: Kafo-paŭzo.

11.45 : Dua studperiodo.

12.45 : Paŭzo por kune tagmanĝi en proksima restoracio. Ĉiu pagas sian manĝon surloke.

14.15 : Tria studperiodo.

15.15 : Te-paŭzo.

15.30 : Kvara studperiodo.

16.30 : Konkludo de la renkontiĝo en la salono de CDELI, kie eblas resti por babilu teumante, kaj por aĉeti librojn, ĝis sia propra foriro.

17.30 : Oficiala fermo.

CDELI-enirejo: Centra pordo **norde** de la domo de la Biblioteko (Progrès 33). Se la pordo estas fermata, sonorigu (CDELI-sonorilo) : iu venos malfermi. Supreniru ĝis la 2a etaĝo.

Por atingi la Bibliotekon

La Biblioteko troviĝas ĉe la numero 33 de la strato Progrès. El la stacidomo ĝi atingeblas per la buso 304, direkto "Hôpital", 3-a haltejo: "Bibliothèque". Aŭtomobilistoj sekvu la ŝildojn vojmontrantajn "Bibliothèque". Bonvolu parki en la stratoj de la kvartalo, ne en la korto.

Ni ĝojos renkonti vin kaj helpi en la praktikado de Esperanto.

Monika Molnár, Nancy Fontannaz, Luc Allemant, Stefano Keller, Nicole Margot, Danielle Carrier.

Sub la aŭspicio de Sviza Esperanto-Societo (SES) kaj de Sviza ILEI-Sekcio (SIS)

CDELI, Bibliothèque de la Ville, Rue du Progrès 33, 2303 La Chaux-de-Fonds (NE), Suisse. Tél. +41 32 967 68 42
www.cde.li/cours | [Studsabatoj](#) | [Samedis d'étude](#) | [Studiensamstage](#) | www.lernu.net

Eldono: 2017 decembro 27/28